

Interasocia Renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe Mediteraneo

22a-26a de Aprilo 2011

SETO



ESPERANTO

Raporto de Hubert De Meyere kaj Michèle Villers

Interasocia Renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe Mediteraneo.

Seto 22a ĝis 26a de aprilo 2011

Raporto de Hubert De Meyere kaj Michèle Villers.



Tio ne estas ĝenerala raporto pri la tuta kongreso.

Ni volas nur atesti pri kelkaj el niaj spertoj dum la kongreso.

ENHAVO

1. Kiuj organizis, kion kaj kiel
2. Kiel ni ŝatis
3. Kion ni faris kaj enkapiĝis

La geedzoj Michèle kaj Hubert
De Meyere - Villers dum promenado en Seto



La Langvedoka- Rusiljona Federacio

**Invitis la plej gravajn
asociojn agantaj en
franclingvaj landoj
partopreni komunan
renkontiĝon.**

La Langvedoka-
Rusiljona Federacio
arigas
Esperantistojn,
individuojn
kaj
grupojn,
aktivajn en la Regiono.

La loko komitato [Klaku tie por havi la nomojn](#)





SAT-Amikaro
*
Esperanto France
*
Langvedoka-
Rusiljona Federacio
*
Fédération
Espérantiste du
travail
*
Franca Fervojsita
Esperanto-Asocio
*
Groupe des
enseignants
espérantophones
*
Eurokka
*
Franca Katolika
Esperanto-Asocio
*
Franca Esperanto-
Instituto
*
Eŭropo Demokratio
Esperanto

La Partoprenintaj asocioj

La fakto ke tiom da
asocioj komune
kongresis igis tre
multenombrian
partoprenantaron.

Aliĝis 392 homoj, kio
ebligis pli ambician
programon kun elstaraj
kontribuoj de artistoj
kaj de eminentaj
prelegantoj.

Aliĝintoj

Landoj	
France	322
2 Catalogne	15
3 Belgique	8
4 Pays-Bas	7
5 Russie	5
6 Népal	2
7 Allemagne	2
8 Bosnie	2
9 Italie	2
10 Luxembourg	2
11 Japon	2
12 Espagne	1
13 Norvège	1
14 Cuba	1
15 Suisse	1
16 Tchéquie	1
TOTAL	375

Francaj regionoj	
1 Ile-de-France	49
2 Languedoc-Roussillon	49
3 Midi-Pyrénées	40
4 d'Azur	32
5 Rhône-Alpes	26
6 Aquitaine	23
7 Bretagne	15
8 Auvergne	10
9 Centre	10
10 Bourgogne	9

11 Pays de Loire	9
12 Nord Pas-de-Calais	9
13 Franche-Comté	8
14 Alsace	7
15 Poitou-Charentes	6
16 Limousin	5
17 Haute Normandie	4
18 Corse	4
19 Champagne-Ardennes	3
20 Lorraine	2
21 Basse Normandie	1
22 Picardie	1
TOTAL	322

aliĝintonombro fine estis 392



Kompreneble ne eblis havi ĉiujn sur la foto!

La programo estis tre alloga.

Resume:

- dekkvar prelegoj,
- kvar parttagaj vizitoj,
- tri tuttagaj ekskursoj,
- sep vesperaj spektakloj,
- premiere filma prezentado,
- ekzamenoj : KER + FEI,
- ĝeneralaj kunvenoj de asocioj.

*Por vidi la programon detale,
klaku ĉi tie*

Le Lazaret

Village vacances et lieu de réunion. Sète Méditerranée



La prelegoj

Ni partoprenis la blukolorajn prelegojn

Senad Čolić, Bosnio - Peresperanta solidareco en Bosnio

Maritza Gutiérrez González, Kubo en la 21a jarcento – revoj kaj realoj

Katalin Kováts, Hungario : Kio estas la KER-ekzamenoj?

*

Marek Blahuš, Ĉeĥio: E@I Edukado ĉe Interreto – Ateliero pri Vikipedio

*

Sanpei Keiko, Japanio : Bildoteatro

Narendra Raj Bhattarai, Nepalo : Ĉu vi konas Nepalon?

Abel Montagut, Katalunio : Jules Verne kaj Esperanto: la lasta romano

*

Farri, Katalunio : La Okcitana, ĉu prihontinda lingvo?

FORUMO pri la OKCITANA LINGVO

*

Francio

Pierre Bouvier : Ĉu Esperanto estas fundamente facila lingvo?

Didier Janot : Prezento de EDE

Philippe Chavignon : Solidara turismo en Mezameriko: majaa kulturo kaj kalendaro

*

Guy Martin : Per Esperanto por helpo al migruloj en Francio

*

Jacques le Puil : La humuro ĉe Lorjak kaj Beaucaire.

Arno Lagrange : Historio de Langvedoko

Michel Lafosse : Vagonara signalado

*

André Mirc : La rapideco de trajnoj

Por vidi klarigojn, klaku ĉi tie



Vendrede 22a en Lazaret 20a 30

Sabate 23a kino Comedia 20a



FaMo

la landoj
Esperanto
FILMO

*Dominique Gautier prezentas
sian filmon «Esperanto» premiere*

La spektakloj (1)

Sabate 23a en teatro Georges Brassens 22a

Jacques Yvart

kantas

Georges Brassens

en Esperanto



Dimanĉe 24a en teatro Georges Brassens 21a



*Kapriol! frisa folkmuziko
Kaj Tiel Plu tradicia kataluna/okcitana*



La spektakloj (2)

Lunde 25a en Lazaret 21a



*TTT:
Teatro Trupo de Tuluzo
Patric:
okcitana kantisto
JoMo kaj Solniška:
slava etoso*



La turista oficejo de Seto proponis viziti la urbon per elektronika memgvidilo en Esperanto.



Tuttagaj ekskursoj

Eta Kamargo : mardon la 26a



La sudo kanalo : mardon la 26a



Tra Cevenaj montetoj per vaportrajno : merkredon la 27a

Interasocia Renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe Mediteraneo > Bonvenon !



Ege rimarkinde estas ke la organizantoj sukcesis krei multlingvan ret-paĝaron.

Elekteblaj lingvoj krom Esperanto : germana, angla, hispana, finlanda, franca, itala, portugala, slovena, rusa.

Ankaŭ ekzistas du lingvaj versioj : esperanta - franca, esperanta - germana.

La retpaĝaro de IREM 2011 estis pretigita en la komenco dulingve: france kaj Esperante.

Kaj, ĉerizo sur la kuko : ebleco aldoni aliajn lingvojn.
Por aldoni alian lingvon ekzistis [tradukejo](#).



Por aliri la bonvenon paĝon : [Klaku ĉi tie](#)

Sur la bonvena ekrano, simple alklaku iun flagon por eniri la nacian lingvon.

Interasocia Renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe Mediteraneo > Bonvenon !



Por ĉiuj demandoj pri la retejon bonvolu turni vin al la retejestro: [Arno Lagrange](#)

Por prepari tiun raporton, ni prunteprenis materialojn el tiu paĝaro.

Kompreneble, ni varme dankas ĉiujn aŭtorojn.

Esperantujo

Esperantistoj de la mondo



La partoprenintoj ricevis tre kompletan libreton kun 48 paĝoj. Ĝi ilustras ĉion kio utilas por plene ĝui la kongresojn.

Interasocia Renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe Mediteraneo

22a-26a de Aprilo 2011

SETO

ESPERANTO



 IREM 2011
 






<http://esperantosete2011.fr>

ENHAVO DE LA LIBRETO



Bonvenon al IREM 2011 !

Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo
kunorganizita de Esperanto-France, SAT-Amikaro, FFEA, FKEA, GEE, Eurokka kaj Langvedoka-Rusiljona Esperanto-Federacio

Salutvorto de la urbestro	3
IREM 2011	4
Ekzamenoj	5
Prelegoj	6-15
Vizitoj	16-19
Urbomapo	20-21
Mapo de Lazaret	22-23
Programtabelo	24-26
Tuttagaj ekskursoj	27-28
Urba Seto kaj ĝia regiono	29
Infanoj de Seto	30-32
La garigo	33-35
Olivkultivado	36
Historio de Langvedoko	37
Esperanto en politiko	38
Praktikaj informoj	39
La salonoj	40-41
Spektakloj	42-45
LOKO	46
Adresaro	47



2. Kiel ni ŝatis

Ni ege ŝatis la kongreson.

Ĉi tiu ege sukcesa evento atestas de la ekstraordinara potenco de la esperanta movado.

Kiel belgoj, ni ne povas maltrafi la okazon laŭte krei nian nacian devizon :

« Unueco donas forton »



**Komprenoble, ne eblis
partopreni ĉiujn agadojn
ĉar multaj okazis
samtempe.**

Ni partoprenis :

- tri vizitojn : fiŝaŭkcio,
monteto « St Clair »,
« Cap d'Agde »
- sep spektaklojn
- ses prelegojn el dekkvar.

**Ni ne partoprenis
tuttagajn ekskursojn.**

**En ĉi tiu raporto, ni
rilatas :**

- nian riĉemocian vojaĝon
por atingi « Le Lazaret » la
21a de majo 2011 nokte,

- kion ni ŝatas memorteni
de la prelegoj, ekskursoj
kaj spektakloj.

**Ni ankaŭ prezentas
novajn amikojn.**



Nia riĉemocia vojaĝo por nokte atingi « Le Lazaret » la 21an.

La vojaĝo kiel ni antaŭkalkulis :

- flugo per RYANAIR ekde Suda Bruselo (Charleroi) ĝis Montpeliero,
- naveto ĝis la stacidomo de Montpeliero,
- trajno ĝis la stacidomo de Seto,
- veturilo de la stacidomo de Seto ĝis la feriejo « Le Lazaret » .

Il existe 3 itinéraires possibles :

Chemin de la Montmorencette	Chemin du Mas -Rousson	N112 Chemin de la Mogeire
Coût estimé	-	-
Temps	00h53	-
Distance	3.5 km	-

Ni antaŭkalkulis alveni tien antaŭ la deka vespere.

Do, ĉio devus okazi glate.

Tamen, mi kutimas antaŭzorgi per anstataŭa solvo okaze de bezono.



Per « via Michelin » paĝaro, mi vidis ke estas 3.5 kilometroj de la stacidomo de Seto ĝis la hotelo. Piede ni bezonus laŭ Michelin 53 minutojn.

Sur la mapo de la urbo Seto saĝnas esti agrabla promenado tra la parko Mont St Clair !

Mi printis la mapon kaj la vojtabelon kiujn ni prenis kun ni.

Nia riĉemocia vojaĝo por nokte atingi « Le Lazaret » la 21an, (daŭrigo 1)

Kio vere okazis: la vojaĝplano tute fiaskis!



La aviadilo, kaj la trajno tiom malfruis ke ni ne plu povis havi iun veturilon de IREM por aliri « Le Lazaret ».

Ni alvenis al la stacidomo de Seto je la 23a kaj 40, kaj konstatis ke eĉ ne plu estis taksio havebla. **Nur restis nia anstataŭa solvo.**

Michèle decidis : «ni havas planon kaj povas piediri 3.5km dum 53 minutojn ne estas tiom terura ».

La promenado estis tre agrabla, la vetero belega, la vojoj bone lumigitaj. La plantoj bonege odoris, la plano estis ege preciza ...do mirinda nokta sperto!

Sed, kiam ni aliris « Chemin de la Montmorencette », ni malkovris la ŝtuparojn.

Laŭ la mapo estis nur 600 metroj sed mi poste kalkulis ke por grimpi 180m estas pli ol 100 ŝtupoj.

Imagu nokte kaj kun rulvalizoj! Mi timis ke Michèle suferus koratakon!

Nia riĉemocia vojaĝo por nokte atingi « Le Lazaret » la 21an, (daŭrigo 2)



Sur la panelo sube, oni vidas ke iu aldonis ion kion nun ne plu estas legebla. Sur la suba panelo estas klare.



Plue, la nomoj de la stratoj ne plu kongruis kun la mapo.

Michèle estis tiel laca ke ŝi haltis, kaj sidiĝis sur sian valizon. Fronte al ŝi, ŝi rimarkis tiujn panelojn.

Oni ŝanĝis la nomojn de la vojoj...
Michelin ne sciis! Nek ni kompreneble!
La agrabla promenado iĝis infero!

Kiam ni finfine atingis « Le Lazaret », la krado estis jam fermita.

Feliĉe ni trovis sonorilon kun parolilo, kaj tre afabla gardisto respondis kaj malfermis la kradon.
Uf!

Tamen, nia problemo ne estis ankoraŭ solvita ĉar la gardisto ne konis la numeron de nia ĉambro, kaj eĉ ne havis la ŝlosilojn!

Nia riĉemocia vojaĝo por nokte atingi « Le Lazaret » la 21an, (daŭrigo 3)

La gardisto finfine memoris ke blinda muzikisto ankaŭ alvenis malfrue...kaj li konis la numeron de lia ĉambro.

Feliĉe, li ne ankoraŭ enlitiĝis, kaj povis telefone alvoki Jean-François Pasarella, kiu tuj venis kun la ŝlosilo de nia ĉambro, kaj alportis niajn du piknik-manĝaĵojn.

Ni eniris la ĉambron je la dua horo nokte, kaj tre plezure manĝis.
Ĉio bone, kio bone finiĝas.

La sekvantan matenon, ni havis grandegan sukceson kiam ni eniris la restoracion por matenmanĝi, ni aŭdis :

« Estas la du belgoj kiuj grimpis la « St Clair » monton nokte...gratulon »!



Famo

Por ni, ambaŭ amikoj estas definitive sanktuloj.



Jean-François Pasarella

Niaj Vizitoj



Ni elektis tri vizitojn kiujn brile gvidis la geedzoj Monique kaj Serge Esseric



Serge



Monique

Fiŝaŭkcio en Seto



Nun, la fiŝaŭkcio estas tute elektronike aŭtomatigita.
La antaŭa brua svarmo malaperis.
La fiŝoj defilas en ujoj per robotigita transportorimedo.

La informoj pri la fiŝoj aperas sur ekranoj.



La maldekstra ekrano informas pri la nomoj de la fiŝistaj ŝipoj kaj pri iliaj enhavoj.

La dekstra ekrano montras la informojn pri nuna vendata ujo da fiŝoj.

La prezo po kilogramo malkreskas ĝis tiam iu aĉetas.

Se pluraj aĉetas samtempe, la prezo de nove kreskas, ĝis iam restas nur unu sola aĉetisto.

La klientoj aĉetas per premo de iu butono de propra teleŝaltilo.



E2

Monteto St Clair
Dimanĉon 24an
14a horo **013**

Serge, tre kompetente klarigis la originon de la Monto « Saint-Clair », kiu naskiĝis proksimume 5 milionojn da jaroj antaŭ nia epoko.

Ĝi iĝis insulo pro giganta falego kiu disigis ĝin de la Masivo de la *Gardiole*.

Tiu insulo, kromnomata «la Aparta Insulo» (*l'Île Singulière*), denove estis religita al la marbordo (fine de la 15-a jarcento), dank'al sedimentoj el la rivero Rodano, transportitaj de maraj fluoj.

La urbo Seto estis kreita sur tiu situo fine de la 17-a jarcento.

24.0



De la supro de la Monto « *Saint-Clair* »,
oni povas admiri la belegan panoramon

:

la urbon,
la havenon,
la lagunon *Thau*,
kaj
la tutan ĉirkaŭaĵon.



Sur la suda flanko
de la Monto *Saint-Clair*
estas la parko «*Les Pierres Blanches*»,
kie oni povas trovi kaj observi
multe da tipaj plantspecioj de la garigo.

Ankaŭ eblas interesigi pri la homa
okupado.



La preĝejo
« **Notre-Dame-de-la-Salette** »
estis konstruita supre de la monto
Saint-Clair dum la 18-a/19-a jarcento.
La interna moderna dekoracio datas de
1952.



24. 04. 2011





E3

Cap d'Agde
Lundon 25an

14a horo 023

Gvidis Monique Esseric



Tute artefarita banejo, proksime de Seto: ni vidis la plej novan kaj la plej antikvan partojn.

Unue ni vizitis la muzeon kiun oni nomas, france «*le musée de l'éphèbe*», pro fama statuo elakvigita el la rivero Hérault.

Due, tute apude, piede ĝis la Konko: kurioza, nigra, duoncirkla strando el bazalteroj. Antaŭ almenaŭ duonjarcento ĝi estis nura aĵo videbla en tiu loko.

Est-ce trop
demander...
sur mon petit
L'pin, plantez
je vous prie une
espèce de pin, pin
parasol de préférence



Ekde la kongresejo, ni piede promenis ĝis
la tombejo Py en kiu troviĝas la tombo
de Georges Brassens.

Apud la tombo, staras epitafo kun
teksto el iu kanto de Brassens :

« Ĉu estas tro peti...
Sur mia malgranda terpeco,
Plantu, mi petas
iun sorton de pino,
prefere parasolan pinon »



**Sennoma artista
metis portreton
de Georges sur la
tombon.**

Prelegoj

Sur la paĝaro de IREM 2011 oni trovas bonan prezenton de la dekkvar prelegoj.

Por vidi ĝin, klaku ĉi tie

Ni elektis ses prelegojn kiujn ni klasifikas en du kategoriojn.

La unua kategorio temas pri la okcitana historio, lingvo, kaj kulturo.

Arno Lagrange : **Historio de Langvedoko**

Farri, Katalunio : **La Okcitana, ĉu prihontinda lingvo?**

FORUMO pri la OKCITANA LINGVO

Mi enkapiĝas ke la okcitana lingvo estis antaŭe la lingvo de la popolo, kaj la franca tiu de la burĝoj.

La premo por trudi la francan estis tiom forta, ke la okcitana preskaŭ malaperis.

Nun, iu minoritato, ĉefe intelektuloj, klopodas por revigligi la okcitanan lingvon.

La nuna situacio estas ke la okcitana lingvo iĝis nun ĉefe lingvo de burĝoj.

Kiel belgo de flandra deveno, mi konstatis similan evoluon de la flandraj dialektoj kaj de la nederlanda lingvo (ABN)

Algemeen Beschaafd Nederlands - ĝenerala bona nederlanda lingvo.

Kelkaj jardekoj antaŭe, la intelektuloj senvalorigis la dialektojn.

Nun, almenaŭ ĉiuj parolas la ABN, kaj do ne plu estas malbona socia signo paroli flandre.

Tamen, la flandraj dialektoj neniam vere malaperis, kaj estas nun ĉiam tre uzitaj.

Por la fremduloj, tio malfaciligas la praktikon de la ABN.

Ni elektis ses prelegojn kiujn ni klasifikas en du kategoriojn (daŭrigo 1).

La dua kategorio temas pri Esperanto.

Pierre Bouvier : *Ĉu Esperanto estas fundamente facila lingvo?*

Jacques le Puil : *La humuro ĉe Lorjak kaj Beaucaire.*

Guy Martin : *Per Esperanto por helpo al migruloj en Francio*

Mi tre ŝatis la prelegon de Pierre Bouvier kiu respondis kelkajn gravajn demandojn.

Kiel kompreni la 11-an regulon de la Fundamento: danke al la Unua Libro?

Kial ĝi estas nepre fundamenta?

Kiel uzi ĝin por instrui nian lingvon?

Ĉu Esperanto, danke al tio, indas la titolon de « facila lingvo », eĉ « bona lingvo » (Vd. libron de [Claude Piron](#)).

Li klarigis sian personan metodon konstruitan de Unua Libro, La Fundamento kaj la romaneto(j) de C. Piron.

Guy Martin cedis grandan parton de sia tempo al la samideano Josefo, civitano de la antaŭa belga Kongo.

Josefo rakontis la dramon kiun li travivis dum la milito en orienta Kongo (provinco Kivu), kiel li sukcesis forfuĝi el priso, kaj finfine atingi Parizon.

Li estis helpita de esperantistoj kaj trovis vivremedojn en Francujo.

Spektakloj



Famo
kaj
Jacques
Yvar

Esperante
kantis

sole
kaj
kune



Sète du
22 au 26 avril 2011

Jacques Yvart chante Georges Brassens en espéranto

samedi 23 avril à 22h
salle Georges Brassens




Samedi 23 avril - cinéma le Comcedia à 20h30
Dominique Gautier présente son film «Espéranto» en première (tarif 4€)

Dimanche 24 avril - salle Georges Brassens à 21h
Bal folk « Kaj Tiel Plu » traditionnel catalan/occitan - « Kapriol'! » folk frison

Du 18 au 30 avril - médiathèque François Mitterrand - Bd. Danielle Casanova
Exposition «Espéranto... le monde au bout de la langue»

Les invitations pour les soirées du 23 et du 24 sont à retirer dans la limite des places disponibles
à l'office de tourisme à Sète - 60, Grand'rue Mario-Roustan - Tél. 04.99.04.71.71



Afiŝo koncertoj en Sète
IREM- Pasko 2011



Michèle
Jacques Yvart
Famo
Hubert



Patric : okcitana kantisto

Patric ofertis florbukedon de okcitanaj kantoj, de la tempo de la trobadoroj ĝis nun, inkluzivante la grandajn sukcesojn kiuj igis lin la neforgesebla granda artisto de Okcitanio.

JOMO : esperantista artisto

JoMo prezentis slavecan dancigan programon kun la muzikistoj de la grupo « La Liberecanoj » kaj la dancensemblo Solniška.

JoMo slavumas kun solnicka



JoMo slavumas kun solnicka



Fotis Arie Bouman



La kataluna/okcitana grupo « kaj tiel plu,



kaj la frisa Kapriol folkmuzika grupo,...



...bone sukcesis dancigi la partoprenintajn.



Ankaŭ tre gravas ke ni denove plivastigis la rondon de niaj amikoj.
Ni prezentas tiujn kiujn ni fotis.





Eugène PAPIAK poldevena esperantisto, Josiane PAKCIAK belga devena esperantistino.
Edmond PLUTNIAK kiun ni jam de longe konis.
Ĉiuj loĝas en Francujo



Esperantistoj el Grenoble :

Nicolay kaj Marie Thérèse DIMITROV

Elisabeth GARDEN



Fino